**Universala Esperanto-Asocio**

**RAPORTO PRI 2014**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

Estrara Komuniko EKO, numero 2015/23, sendita el Budapeŝto, la 26an de junio.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Al: La Komitato kaj Konsilio de UEA, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# Ampleksa raporto de la Estraro pri 2014

La raportado de la Estraro pri la jaro 2014 havas kvar versiojn en PDF-formato. Elektu laŭ via legpreteco:

1. La oficiala raporto, 4-paĝa, represo en la junia revuo Esperanto. Videbla en TEKO.
2. La oficiala raporto, 10-paĝa, kun ilustraĵoj kaj enhavtabelo. Disiris kun EKO 21.
3. La ampleksa raporto, 26-paĝa sen ilustraĵoj, kun enhavtabelo. Ricevebla kontraŭ peto.
4. La ampleksa raporto, 35-paĝa kun ilustraĵoj, enhavtabelo kaj indekso.

La kvaran eron, ni, eĉ fiere, alkroĉas al la nuna komuniko. Ni provis en la raporto prezenti ĉiun eblan agadon en la E-komunumo, tamen kun emfazo al la agado de la estraranoj kaj la multegaj agantoj ene de la UEA-familio. Ni konscie provis inkluzivi ĉiajn eblajn iniciatojn, landojn, fakojn, homojn, kiom ni povis. Eĉ en reta raporto, kie neniu spaca limigo estas, tamen ekzistas limo – la preteco de homoj fakte legi ĝin. Sekve, sendube mankas la nomoj de multaj meritaj homoj kaj agadoj – pro tio ni pardonpetas anticipe.




La Komitato voĉdonos en Lillo nur pri la oficiala raporto, kiel publikigita en la junia numero de revuo *Esperanto*, kies kovrilon vi vidas apude. Tamen, viaj komentoj, demandoj kaj reagoj pri la oficiala aŭ la ampleksa raporto restas bonvenaj.

Se eble, ni traktos tiujn antaŭ Lillo, sed se vi opinias ion sufiĉe gravan, menciu ĝin al via komitatano por eventuala levo dum la koncernaj diskutoj.

Fine, ni humile proponas la tezon, ke ni nun enmanigas al vi la plej alloge prezentitan kaj plej ampleksan, tamen digesteblan, jarraporton de ajna estraro tra la 107-jara historio de la Asocio.

## Junaj voĉoj

Meze de majo en la pola urbo Wrocław okazis plia festivalo en la ĉiujara serio de lernejaj aranĝoj pri Esperantaj Kantoj. Tion organizis la regiona buroo en Vroclavo de la Centro de Interkultura Edukado.

La foto sur la sekva paĝo montras la koruson Górowianie el la klubo de Esperanto en Góra, Pollando. La foton faris Josip Pleadin el Koratio. La urbo Vroclavo gastigos la 72an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en 2016, plie ene de tiu jaro la urbo ricevas la epiteton 'Kultura Ĉefurbo de Eŭropo', kiun la loka E-societo planas bone ekspluati.



## Aranĝoj en Greziljono

Kiel imageble, tiu kulturcentro organizas eventojn tuj post la Universala Kongreso. De la 1a ĝis la 8a de aŭgusto okazos programo: 'Lingvoj kaj Kulturoj de la Mondo'. La centro planas organizi aŭtobusan vojaĝon al la kastelo tra Parizo fine de UK. De la 8a ĝis la 19a de aŭgusto okazos la tradicia renkontiĝo por infanoj kaj familioj (vidu la foton sube). Pliaj informoj ĉe: www.gresillon.org



Vortoj: 415

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Se vi volas vidi pli malnovajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...